

Интригатор М.: Математические методы оптимизации и экономическая теория. Москва: ирис пресс, 2002, p. 566.

Adreso de la aŭtoroj

S-ro Stasys GIRDZIJAUSKAS,

S-ro Gintautas GARŠVA,

S-ro Egidijus MERKEVIČIUS

c/o Vilniaus universiteto Kaunas humanitarinis fakultetas

Muitinės g. 8,

LT 44280 Kaunas / LITOVIO

<stasys.girdzijauskas@vukhf.lt>

Priaŭtoraj informoj

Stasys GIRDZIJAUSKAS naskiĝis en 1941. Finis en 1963 Kaunas Tehnologian Universitaton kaj dum kvin jaroj laboris kiel inĝeniero en diversaj industriaj entreprenoj. En 1972 en Kaunas Tehnologia Universitato defendi doktoran disertacion. Ekde 1974 laboras en Vilnius Universitato Kaunas Humanisma Fakultato (VU KHf) kiel docento, dum 20 jaroj estis vicdekano de tiu ĉi fakultato, kaj ekde 2003 estas elektita kiel dekano. Sciencaj interesoj de lasta periodo: financa matematiko. Li kreis teorion de loĝistika regado de kapitalo. Faris ĉirkaŭ 20 eltrovojn, verkis 5 librojn, publikigis kelkdek sciencajn artikolojn pri maŝina teorio, financa regado kaj pedagogio de altlerneja edukado.

Gintautas GARŠVA naskiĝis en 1951. En 1969 finis nuntempan gimnazion "Aušra" kaj en la sama jaro enskribiĝis al Kaunas Tehnologia Universitato, kiun finis en 1974; en 1988 akiris specialigojn de inĝeniero elektrikisto kaj de aplikata matematiko. Doktoro de teĥnikaj sciencoj ekde 1979, docento pri matematiko ekde 1996. Ekde 1993 laboras en Vilnius Universitato Kaunas Humanisma Fakultato (VU KHf) en la katedro pri Informadiko, por bakalaŭroj kaj magistroj prelegas pri komputila komunikado, internaciaj datumbazoj, multmediaj kaj interretaj teĥnikologioj. Direktoj de scienca laboro – informistemoj de solvado de intelekta risko, internaciaj informistemoj de regado, datumbazoj kaj retoj.

Egidijus MERKEVIČIUS naskiĝis en 1951. En 1997 en Kaunas finis gimnazion "Saulė", en la sama jaro enskribiĝis al Vilnius Universitato Kaunas Humanisma Fakultato por studi komercan administradon kaj merkaton; en 2001 bakalaŭriĝis kaj en 2003 kun laŭdo defendis magistran laboron. Nun en katedro de Informadiko pretigas disertacion pri "Sistemo de intelekta regado de risko de kreditoj".

Komento

Ni kuraĝe rekonsideru kaj likvidu niajn organizajn kaj strategiajn mankojn¹

Marĝene de mia libro²

Ignat Florian BOCIORT

Enkonduko

Mi estis iom surprizita kiam s-ro *Fritz Wollenberg*, la organizanto de la Kulturgrupo de Esperanto-Ligo *Berlin*, Germanio, invitis min proponi por diskuto kelkajn ideojn de mia novaperinta libro. Ne estas kutimo, ke la aŭtoro mem parolu pri sia libro. Tamen, malpermesita tio ankaŭ ne estas, precipe en Esperantio, kie ankoraŭ ne agadas profesiaj kritikistoj – ni kvazaŭ ĉiuj esperantumas nur dum nia libertempo. Krome, la prezento farita de la aŭtoro mem povas roli kiel "ĝenerala superrigardo", kiel klara indiko de la celoj kaj esencaj aspektoj de ampleksa kolekto de eseoj, studoj, artikoloj, polemikaj reagoj, eseaj rakontoj kaj similaj. Certe tio ne forprenas de ĉiuj ajn legantoj la rajton esprimi proprajn opiniojn, komentojn kaj kritikojn pri la libro. Gravus nur la fakto, ke oni devas kapti ĉiun okazon por firme, kuraĝe kaj respondece ĝustigi nian agadon, por ke la Esperanto-movado pli taŭge, pli altnivele efektivigu siajn ŝarĝojn.

Bonvolu konsideri la opiniojn esprimitajn en la libro nur kiel kontribuon al necesa analizo de niaj organizoj kaj strategioj. Tiuj ĉi opinioj baziĝas sur sinteza kolekto de sukcesaj kaj malsukcesaj spertoj de niaj agadoj en kelkaj landoj kiel Kroatio, Bulgario, Hungario, Pollando, Ĉinio, la iama GDR kaj Rumanio; memkompreneble estis priatentitaj ankaŭ la internaciaj organizaĵoj, same kiel la personaj disku-

¹ Prezento ĉe Esperanto-Ligo *Berlin*, la 22-an de oktobro 2007

² *Ignat Florian Bociort*: "Esperanto. Movado, Strategio, Estetiko, Rakontoj" *Timișoara*, 2007, 652 p.

toj en kluboj kaj rondoj kun esperantistoj, precipe kun gvidantoj de diversnivela organiziĝo. Temas ankaŭ pri spertoj kaj iniciatoj, kiujn la aŭtoro mem faris aŭ verifis dum ĉirkaŭ 30-jara poresperanta agado.

Mi ne asertas, ke la opinioj kaj sugestoj validas ĉie, sed ja asertas, ke ili validas ne nur en la koncernaj landoj, kaj ĉie estas utile atenti pri la praktikaj spertoj kaj teoriaj diskutoj aperintaj en nia movado. En la libro ne estas ripetitaj la atingiĝoj pri kiuj informis la ĉiujaraj raportoj de UEA. Mi estas certa, ke ankaŭ vi, fidelaj kaj spertaj esperantistoj, ofte pensas ne tro kontentaj pri la hodiaŭa situacio de nia movado. Ni kaptu la okazon por sincere kaj kuraĝe diskuti pri nia afero. La libro ne aperis kiel ambicio de maljunulo aperigi ankoraŭ plian libron. Ĝi entenas pensojn, ĉagrenojn kaj dolorojn, kun kiuj mi turnas min por la lasta fojo al nia movado, cele atentigi ĝin pri faktoj malakceptendaj, pri mankoj ofte menciitaj fare de diversaj spertuloj de nia movado.

Ĉiu organizaĵo, ĉu politika, ĉu kultura, kiu konstata ke ĝi stagnadas, lanĉas la devizon: “Ŝanĝu la pensmanieron!” – la nuna praktiko do ne (plu) validas. Ne nur laŭ mia opinio ni devas ŝanĝi niajn strategiajn, novigi niajn strukturojn. Ne eblas, ke la sugestoj de la esperantistaro restu krio en dezerto, **ke oni preskaŭ ĉesis efike kontakti la ekstermovadajn mediojn**, ke la multekostaj Universalaj Kongresoj apenaŭ alportas klarigojn pri Esperanto en la kongreslandoj, ke la gejunuloj estas malmultaj kaj nesufiĉe celkonsciaj, ke la movadon minacas la danĝero hobiigita, ke malaperas optimismo kaj entuziasmo, ke entute centjara movado antaŭeniras kun rapideco de centjara homo, kiel konstatis nia sociologo *N. Raŝić*. Tiaj fenomenoj estas des pli damndaj, ke ni disponas pri sufiĉe novaj ekzemploj ke la movado en certaj landoj rapide kreskis, plijuniĝis, unuiĝis, scienciĝis. Do ni devas vekigi al realo kaj niajn konsciencojn kaj niajn gvidantojn, agemigi la karakterojn, forĵeti la aĉajn sensencajn kvereladojn, pli firme agadi en la amasmedioj ktp.

Ni kuraĝe agu kontraŭ la obstakloj ene kaj ekstere de la movado. Oni asertas, ke iuj niaj strukturoj burokratiigis dum la lastaj jardekoj, ke iuj niaj rondaj aŭ klubaj gvidantoj ŝajnas indiferentaj al antaŭenigo de Esperanto, aŭ estas por ili sufiĉa la nuna situacio, aŭ ili eĉ rezignis pri la “sankta espero” kaj interesiĝas precipe pri mono, kotizoj k. s. Pri tiaj aspektoj mi ŝatus ŝanĝi hodiaŭ vespere opiniojn orientitajn al **solvoj kaj decidoj**. Sen la intenco resumi la libron, mi petas la atenton pri kelkaj punktoj, kvazaŭ tezoj:

1. Rezigni pri ŝtoniĝintaj strukturoj, reveni al idealo

La esenco de la libro estas strategia. En la unua parto, titolita “Movado, Strategio” troviĝas invitoj al kuraĝaj pensoj kaj agoj por rezigni pri praktikoj damaĝantaj ene kaj ekstere de la movado. Nia precipa ŝarĝo ne estas daŭre proponi al internaciaj instancoj enkonduki Esperanton, sed konsciigi la nuntempojn pri la monda lingvo-problemo, informi pri la jam ekzistanta solvo kaj alporti Esperanton al tiuj, kiuj **hodiaŭ bezonas ĝin**. Tio estas farebla ŝarĝo!

Dum la lastaj 20 ĝis 30 jaroj la movado apenaŭ alproksimiĝis al sia celo. Fakaj asocioj, periodaĵoj, radioelsendoj, universitataj Esperanto-kursoj ktp., eĉ la anoj de niaj organizaĵoj, reduktiĝis. Lastatempe oni parolas kvazaŭ nur pri mono. Ofte oni povas legi: “Pagu pli multe por ke la movado saltu”. Lastatempe skribis tiajn sekajn vortojn grava personeco de la movado. Antaŭ nelonge japano fordonis grandan sumon por informado: tio alportis sensignifan gajnon. Jen ankoraŭ unu provo, ke **ne** tiu estas la ĝusta vojo. La fenomeno de malkresko iras paralele kun la rezigno pri la idealo. Nia movado baziĝas tamen **sur entuziasmo kaj idealismo**. Mono necesas, sed monon pagas la idealistoj. Se en nia movado idealo mankas, ĉio mankas.

2. Pli da celkonscia laboro

Zamenhof pensis pri **batalo** por disvastigi kaj evoluigi la lingvon. Ĉu oni ne povus postuli pli efikan laboron de centoj da UEA-delegitoj, de landaj kaj fakaj asocioj? Ni, la simplaj esperantistoj, devus **sent**i la ĝeneralan intereson pri niaj sukcesoj, malsukcesoj, proponoj ktp. Ĉi-momente nia movado estas dispecigita diasporo de bonvolemaj homoj, kiuj sindoneme agadas laŭ propra bontrovo. Ni laboras kiel “izolitaj pafistoj” (france: *franc-tireurs*), kaj tio facile degeneras al hobiismo.

3. Unuigi la spontanajn movadon kun la scienco

La hodiaŭaj esperantologio kaj interlingvistiko disponas pri plurfakaj argumentoj defende al nia afero. Estas fascina scienco. La pragmatikaj argumentoj estas tuj percepteblaj por ĉiu normala homo, kiu trans la landlimoj estas surda kaj muta. Ĉu kun argumentoj, kaj pragmatikaj kaj alte sciencaj, estus eble, ke niaj homoj agadas ofte nur amatore kaj diletante en siaj kontaktoj kun la ekstermovadanoj? Demandite pri la kialo lerni Esperanton, instruistino respondis nur per banalaĵoj: “Nu, por korespondi kun eksterlandaj amikoj” k.s.

4. Zorgeme kontakti la ekstermovadan medion

Niaj varbantoj kontaktas aliajn homojn sen speciala preparo, pri kiu devis zorgi ne nur ili mem, sed ankaŭ la organizo al kiu ili apartenas. Ofte ni eksciis pri spertoj seniluziigaj. Jen du ekzemploj:

Pasia esperantisto, oficisto en *Cluj-Napoca* (Rumanio), iris al dekanato de la Filologia Fakultato kaj petis la permeson paroli pri Esperanto en la Konsilio de la Fakultato “por en dek minutoj konvinki ĉiujn profesorojn“. Kompreneble la dekanato malakceptis tion kaj la esperantisto konkludis, ke “la universitataj gvidantoj ne interesiĝas pri Esperanto“. – Ĉu vi jam konvinkis viajn kolegojn? mi demandis lin. – Ne, sed mi kredis ke la filologoj ... ktp.

Du erarojn faris la samideano. Unue ni devas paroli en medio al ni permesebla. Eĉ la prezidanto de UEA rajtus paroladi nek en landaj parlamentoj, nek en la Senato de iu ajn universitato. Due, la vorto Esperanto mem estas ankoraŭ por multaj niaj samtempoj senprestiĝaj, kiel ĝuste observis prof. *Frank* (tial li diris Internacia Lingvo – Ilo).

Jen valida sperto: “Sinjoro direktoro, vi certe konscias pri la malfacilaĵoj en la hodiaŭa internacia komunikado. Tiu ĉi problemoj estas komplika, oni ne povas tuj percepti ĝin intuicie. Mi, kiel sociologo, lingvisto, psiĥologo ktp. studis ĝin kaj ŝatus interŝanĝi pri ĝi opiniojn kun viaj kunlaborantoj, kolegoj, gestudentoj“ ktp. Do, oni venas kiel **fakulo** pri aktuala problemoj, kaj la iom kaŝita esperantisto ricevas la permeson. Pri tio mi detale skribis en la artikolo “La intelektularo, tiu grava forgesita forto“ kiel replikon al la opinio, ke kontakti personecojn egalas al “fiflati la gravulojn“.

5. Singarda, sed firma kuraĝo

Neniu povas konvinki ĉiujn homojn pri novaj sociaj ideoj, kiuj ne estas ja tuj praktike pravigeblaj, kiel la teknikaj atingiĝoj; la sociaj tuŝas privilegiitojn. Aldoneblas, ke ne ĉiu homo havas la koron aperta por novaj ideoj, ĉar “sur seka branĉo ne kantas najtingalo“. Tamen ne eblas, ke nur la hodiaŭaj esperantistoj kapablas kompreni Esperanton, dum ĉiuj aliaj samtempoj estas stultaj. Kial do tiom malmultaj ni estas? Pro du kialoj: unue, pro manko de kompetenta kaj daŭra klarigo per kontaktoj personaj kun la ekstermovada mondo; kaj due, mankas granda utileco de Esperanto, fenomeno tipa por ĉiuj agantaj sistemoj en ilia komenca fazo. En la libro mi kulpigis ne la politikist-

ojn, sed unue la sciencistojn – ĝenerale la intelektularon – ĉar tiuj ĉi respondecas pri la destino de kulturaj ideoj en la socio. Kuraĝe, tamen modeste kaj singardeme apogi validajn ideojn estas socia devo. Komence iuj aŭskultantoj estas surprizitaj pri la komplekseco de la ideo, aliaj eble grimacas pri ĝi. Sed poste multaj honestuloj agnoskas, ke “nur nun“ ili komprenas la sencon de Esperanto. La argumentita kuraĝo imponas, sed se oni parolas “sub la tablo“ pri Esperanto, ni ne miru pri indiferenteco: pro tio kulpas nek la ideo, nek la konservativa aŭskultantaro, sed la timema apostolo.

En 1910, dum renkontiĝo de rusaj esperantistoj, *Zamenhof* kritikis la timon de esperantistoj paroli Esperante kaj propagandi Esperanton: li klarigis tion per la impreso, ke eble Esperanto estas nur teoria fenomeno. La hodiaŭaj esperantistoj parolas la lingvon, sed tamen multaj ne kuraĝas informi pri ĝi, ĉar oni timas kontraŭi disvastigitan antaŭjuĝon. Bone estas kontakti, kun kelkaj libroj kaj revuoj, elstaran personecon malfermitan al novaj ideoj. Ekzemple, oni povus kontakti la faman lingviston *Noam Chomsky*, konatan per sia kontraŭimperiisma sinteno.

Iufoje personecoj prestiĝas en Esperantio kaj en siaj laborlokoj, sed neniam prezentis Esperanton al siaj kolegoj aŭ gestudentoj. Ĉu honti? Hontu tiuj, kiuj tridek jarojn prelegas pri la samaj gramatikaj reguloj de la nacia lingvo sed restas fremdaj al novaj ideoj. Ili similas al natursciencisto, ĉe kies fenestro delonge kantas nekonata birdo, sed kiu ne interesiĝas pri ĝi. Ĉu tio estas honorinda?

6. Defendi niajn principojn

Nekontentiga estas ankaŭ la defendo de nia ideo kontraŭ la ekstermovadaj atakoj kaj kontraŭ falsaj teorioj aperintaj en Esperanto. Kompetentaj komitatanoj devus havi tiun ŝarĝon. Al eksterlandanoj oni ne respondu supraĵe kaj ironie en esperantlingvaj revuoj, sed tre serioze per prestiĝaj tekstoj en nacilingvaj periodaĵoj. En Esperantio la pesimismaj, defetismaj, eĉ kapitulacantaj tezoj montras supraĵan laboron de niaj teoriuloj. Legante la asertojn, kiuj tute ne celas la plifortigon de nia ideo, oni pensas pri la vorto de *Albert Camus*: “Oni ĉiam trovas filozofion por manko de kuraĝo“.

En la libro mi proponis replikojn al jenaj kritikendaj tezoj:

- La homoj ne volas Esperanton.
- Esperanto ne havas pacajn funkciojn.

- Nia movado evoluis ĝis certa punkto kaj poste ĉesis evolui, ĉar “neniu arbo kreskas ĝis la ĉielo”.
- Kontakti personecojn signifas “fiŝflati ilin”.
- La movado hobiĝas kaj tio sufiĉas.
- Organizaĵo de Esperanto ne necesas, ĉar jam ekzistas interreto.
- Ankaŭ per internacia lingvo la okcidenta civilizacio influos la ceterajn civilizaciojn, eĉ pli facile per Esperanto ol per la angla.
- La neŭtrala lingvo Esperanto per nenio diferencas disde la angla.
- Ne celkonscia agado antaŭenigas la movadon sed la favora hazardo, ĉar tio aspektas pli nature.
- La sciencistoj ne interesiĝas pri Esperanto.
- Oni ne devas argumenti por Esperanto en internaciaj forumoj por “ne perdi la simpation” de la sinjoroj sidantaj tie.
- Pro disvastiĝo de la angla la Esperanto-movado ne povas eviti krizon; en la libro ne troviĝas lingvistika kritiko de la angla; ni evoluigu nian kulturon, same kiel la iamaj humanistoj evoluigis la nacilingvajn kulturojn, sen kritiki la latinan.
- La argumenton rilate al “propedeŭtika funkcio” de Esperanto mi konsideras nekonvinka, eĉ kontraŭdira, sed mi ne diskutis ĝin.
- La plej serioza inter tiuj diskutindaj tezoj estas tiu, ke Esperanto stagnadas kompare kun la 60-80aj jaroj, ĉar la kondiĉo ŝanĝiĝis. Parte ĝi pravas. La kondiĉoj ne nur ŝanĝiĝis, ili malpliboniĝis. Sed la necesa reago estas krei novajn strategiojn adaptitajn al novaj kondiĉoj. Kiu kapabla generalo rezignas pri batalo ĉar “la kondiĉo ŝanĝiĝis”? La kondiĉoj ĉiam ŝanĝiĝas. Precipe por demokratiaj ideoj, la kondiĉoj estas de komence kaj daŭre malfavoraj.
- La fama eseo de *Plehanov* “La rolo de la personeco en la historio” montras, ke ĝuste dum ŝanĝiĝantaj kondiĉoj vidiĝas la valoro de la gvidantoj, kapablaj tuj ellabori novan strategion. Kiu nova strategio aperis en nia movado post 1990? Eĉ la subjektivaj faktoroj, la entuziasmo de multaj esperantistoj

restis apenaŭ atentataj. Fakte nefavoraj ŝanĝoj okazis en 3 ĝis 4 iamaj socialismaj landoj, kie antaŭe la agado estis pli aŭ malpli apogata. Sed kiaj novaj, nefavoraj ŝanĝoj okazis en la ceteraj landoj de la mondo?

Konvinka respondo al la lamento pro “nefavoraj kondiĉoj” estas la sukcesa praktiko en Kroatio sub la diktaturo de *Tudjman* kaj en Rumanio sub la diktaturo de *Ceaușescu*. Kiaj kondiĉoj povas esti pli malfavoraj ol diktaturo malpermesanta Esperanton? Tamen, la ating-aĵoj ekz. en Rumanio estis grandaj kaj rapidaj, la movado pligrandiĝis, plijuniĝis, scienciĝis kaj unuiĝis. Kun ĉagreno mi konstatis, ke gravulo de nia movado, tiutempe “la generalo”, tute ne interesiĝis pri tiaj spertoj, kaj mi komencis sopiri je la spirito de *Lapenna*. La nuna movado en Rumanio stagnadas pro la samaj mankoj. Anstataŭ mobilizi la homojn, plifortigi la unuecon kaj la kunlaboron, flegi la antaŭajn sciencajn spertojn, malpacas kaj eĉ bojkotas sin la tri asocioj en la lando. Ĉu pro tio kulpas la objektivaj kondiĉoj?

7. Respekti kaj defendi niajn personecojn

En la libro mi reagis al neĝustaj kritikoj kontraŭ *Zamenhof*, *Waringhien*, *Lapenna*, *Tonkin* kaj *Blanke*, apogis la sintenojn de pluraj prezidintoj de UEA, defendis Esperanton, la Manifeston de Prago kaj aliajn. La neraciaj, ofte nur subjektive motivitaj atakoj kontraŭ niaj valoroj montras mankon de etika spirito en la movado.

8. Strategio kaj organizado

Ankaŭ la dua parto de la libro, titolita “Estetiko, Rakontoj” estas precipe strategia, ĉar la du ampleksaj rakontoj *ne estas beletraĵoj*. “En Elizeo kun la ombro de *Ivo Lapenna*” havas la subtitolon “Pri problemoj solvendaj en Esperantio”, do temas pri eseo en dialoga formo. La dua rakonto “La ĉiamaj geamikoj” estas eseo en rakonta formo cele konkretigi miajn sugestojn faritajn al junulara movado agadi en grandaj internaciaj renkontiĝoj de gejunuloj; ĉi-jare tiaj renkontiĝoj okazis precipe en Germanio. La germania kancelierino *Angela Merkel*, en sia fina parolado ĉe tia aranĝo en Berlino, bedaŭris la lingvajn malfacilaĵojn de la gejunuloj. Jen tereno por efika agado.

Fine mi substrekas du ideojn. Unue, mi klopodis mobilizi niajn geamikojn al laboro por verki “*La stilistikon de Esperanto*” – mi fakte

jam verkis la bazon de tia laboraĵo. La rumanaj fortoj estis tro ĉarmultaj por la ŝarĝo, precipe post la forpaso de la lingvistoj *Prioteasa, Vraciu, Apreotesei* kaj *Dominte*. Mia opinio al tiu laboro povus kontribui multaj esperantistoj, kiuj devus nur kopii sur slipojn citaĵojn el libroj, studoj, recenzoj ktp., kie temas pri stilaj faktoj. Poste du aŭ tri lingvistoj povus skribi la verkon.

La dua ideo estas prezentita en la artikolo "Kontribuo al la debato en la strategia forumo de la Universala Kongreso en Gotenburgo". Temas denove pri elpaŝo por penetri en ekstermovadan medion. Neniu persono, eĉ grava sciencisto, facile povus iniciati ampleksajn agojn ĉi-rilate. Necesas "Internacia Komitato por translima Komunikado".

Post tiu artikolo mi ricevis plurajn apogajn leterojn, sed fakte okazis nenio. Mi konscias, ke gravaj iniciatoj havas ŝancon nur se la proponinto mem povus organizi ĉion, same kiel *Frank* organizis AIS-on³ kaj *Blanke* organizis *GIL*-on⁴. Sed mi mem, 80-jarulo, ne plu povas roli kiel organizanto.

Adreso de la aŭtoro

Prof. d-ro I. F. BOCIORT

Wustrower Strasse 1

DE - 13051 - Berlin / GERMANIO

Redaktora aldono

Ignat Florian BOCIORT – profesoro pri estetiko kaj monda literaturo, fidela aŭtoro de sciencrevuaj artikoloj – multege verkis en sia gepatra lingvo rumana kaj Esperanto. Estas salutinde, ke nun estas haveblaj liaj verkoj kaj ideoj libroforme en ampleksa esearo de 102 ĉapitro(et)oj sur 652 paĝoj:

“**Esperanto: Movado · Strategio · Estetiko · Rakontoj**”

(*Editura Mirton*, 2007, ISBN 978-973-52-0019-0):

- interesa legaĵo diversteme distra kaj pensiga
- mallongaj tekstoj okulplaĉe grandlitere presitaj
- libro ne nur por librobreto sed por daŭra legoĝuo de legema leganto.

Mendebla je € 33.00 ĉe Libroservo de UEA, Roterdamo

³ AIS = Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino

⁴ GIL = *Gesellschaft für Interlinguistik e.V.* (GIL) (= Societo por Interlingvistiko), Berlin, Germanio

Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

Hejmpaĝo: <http://www.eventoj.hu/isae/>

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.

Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj

Laserkopiita: Marto 2008 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30*

DE - 37269 *Eschwege*/Germanio

Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare

pagebla pere de via

a) landa peranto (resp. landa delegito)

aŭ rekte al

b) ISAE-konto ĉe UEA/Rotterdam (NL): isae-z *) *vd. sube*

IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF

t. e. por ISAE-anoj el Germanujo: vi pagu (anstataŭ kiel pli frue al ISAE/Sachs) al la

germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en *Köln*,

Germanio, kun indiko "ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z"

Landaj Perantoj de ISAE

Aŭstralio	<i>Libroservo AEA</i> 143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.	<libroservo@esperanto.org.au>
Brazilo	<i>Brazila Esperanto-Ligo (BEL)</i> C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília	<bel@esperanto.org.br>
Britio	<i>S-ro David Kelso</i> 5, Craigenhill Rd., Kilncadzow GB - Carlisle, ML8 4QT	<davidekelso@yahoo.co.uk>
Finnlando	<i>S-ino Päivi Saarinen</i> Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo	<paivi.saarinen@iki.fi>
Francio	<i>S-ro J. Charles Trébouet</i> Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil	<trebouet.bohere@club-internet.fr>
Irlando	<i>S-ino Joy Davies</i> 9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W	<noviresp@eircom.net>
Korea Resp.	<i>S-ro Cho Sung Ho</i> Biol.Fak.Inha Univ., KR Incheon 402-751	<shcho@inha.ac.kr>
Norvegio	<i>Eldonejo Esperanto</i> Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo	<hara-ryg@online.no>
Pollando	<i>S-ino Magdalena Tatara</i> Kośmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka	<mtatara@gmail.com>
Svedio	<i>S-ino Lisbeth Andréasson</i> Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby	<beril.andreasson@horby.mail.telia.com>
Usono	<i>Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA)</i> P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA	<elna@esperanto-us.org>

*) **Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b)**

(kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu

sendata Scienca Revuo) la eldonanto:

Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio

Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAE.Sachs@aol.com>